# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ helmikuu ◆ februaro ◆ 1/2008



*Nova jaro, kaj plu al forta agado en la nova EAF-jarcento. Fotolibron de la jubilea festo studata dum la Zamenhofa tago en la oficejo. De maldekstre Paula Niinikorpi, Baiquan Fan, Markku Saastamoinen kaj Tiina Oittinen.*

## Vintraj Tagoj en Espoo, p. 13

### Multlingva seminario pri multlingveco, p. 4
### Karavano al Roterdamo, p. 5 ◆ Valamo-kursoj, p. 18

# ESPERANTOLEHTI

## Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet   ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 🖳 eaflehti@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*
Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 🖳 mmakita@utu.fi
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 🖳 ilkka.santtila@welho.com
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 20 e/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 🖳 eaf@esperanto.fi
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400


## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Anna Ritamäki*
Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 🖷 (02) 423 246 🖳 eafprezidanto@esperanto.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 🖳 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 🖳 eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:** tuomo.grundstrom
*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 🖳 @lailanet.fi
*Börje Eriksson*, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 🖳 esperarto@phnet.fi
*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 🖳 taneli@poczta.onet.pl
*Jukka Laaksonen*, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 🖳 jvaleto@kolumbus.fi


**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Mira Anonen*, Karstulantie 8 E 70, 00550 Helsinki. ☎ 040 759 2184 🖳 mira.anonen@helsinki.fi
*Olli Pajula*, Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ 050 571 9224 🖳 olli.pajula@baanamail.fi
*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ 040 592 1756 🖳 timo.pirinen@gmail.com

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 🖳 eafkasisto@esperanto.fi
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet**: http://www.esperanto.fi



# Lingua communis omnium civium unionis

Mi antaŭ nelonge aŭdis, ke latinisto proponis novan aspekton al la demando pri diversaj lingvoj en la Eŭropa Unio. Li proponis, ke latino estu nomumita speciala kulturlingvo de la unio, kaj ke tio signifu, ke ĉiuj institucioj de la unio havu nomon en latino, kaj *nur* en latino. Do, oni uzus la latinan nomon en ĉiuj lingvoj, sen traduki ĝin. Ekzemple la parlamento estus *Parlamentum Europaeum*, kaj ne havus la dudekon da alilingvaj nomoj, kaj por aliaj institucioj oni disvolvus nomojn kiel *Unio Monetarum Europae* kaj *Senatus Europaeus*.

Mi ne kredas, ke la propono validiĝos. La ideo tamen estas interesa por pensi. Ĝi donus por la tut-Eŭropaj institucioj certan elegantecon, ĉar ili estus per nomo levataj super la disputojn de diversaj lingvoj, kaj samtempe ili tamen memorigus pri la simileco de pluraj vortoj en la eŭropaj lingvotradicioj.

Por nia strebo efektivigi Esperanton en rolon de ĝenerala komuna lingvo de la Eŭropa Unio la komunaj latinaj nomoj de la institucioj apenaŭ estus malhelpo. Mi pensas, ke ili povus nur glatigi la vojon por enkonduko de Esperanto. Estas ne realisme, ke homoj komencus paroli latinon, se la institucioj havus latinajn lingvojn. Latino ja ne havas ian esencan avantaĝon antaŭ aliaj lingvoj, ĝi ne estas eksterordinare facila lingvo. Tian avantaĝon havas nur Esperanto. Sed antaŭ vasta ekuzo de Esperanto staras forta baro de antaŭjuĝoj. Tiujn aro da aktive uzataj latinaj nomoj povus mildigi. Post tio estus pli facile argumenti, ke ne nur nomoj, sed ankaŭ parolata lingvo povus esti komuna kaj nenies propra.

Oni povas ja demandi, kial do uzi latinon en la nomojn de institucioj, kaj ne Esperanton. Nu, kial ne, ni ja povus proponi, ke oni unue nomigu la Eŭropajn instituciojn per Esperanto kaj iam post tio, post ke la Esperantaj nomoj koniĝis por publiko, ekuzu parolatan Esperanton en la institucioj. Tamen mi pensas, ke latino en la komunaj nomoj havus pli grandan eblecon iĝi akceptata. Latinaj vortoj estas ja nun pli konataj. Ni scias, ke ni estas reprezentantoj de *Homo sapiens*, loĝantoj en *Tellus*, el kiuj iu estas *primus inter pares* kaj iu *persona non grata*. El tiaj esprimoj multaj latinaj vortoj estas jam tiom konataj, ke oni povus imagi latinon akiri uzon en aro da nomoj de Eŭropaj institucioj.

Dubinde estas, ke la sistemo de latinaj nomoj fine vere funkcius. Oni certe ne en finnlingva parolo ĉiun fojon volus diri vortojn “Parlamentum Europaeum” anstataŭ la finnaj “Euroopan parlamentti”, la latinaj vortoj ja estas malfacile deklinaciataj kaj nenature akcentataj inter finnlingva parolado. Evidente oni almenaŭ en parolo uzus la finnajn vortojn, kaj se oni parolus ilin, oni certe almenaŭ en iuj okazoj ankaŭ skribus ilin. Kie do difini limon de uzo de la latina nomo kaj la finna nomo? Ĉu la sekvo estus nur ĥaoso kaj konfuzo?

Ĉiukaze mi ĝojas, ke ankaŭ latino daŭre vivas en diskutoj pri internacia lingvo. Mi ja mem komencis lerni latinon jam pli frue ol Esperanton, kaj kvankam ne tre aktivas pri ĝi, en miaj pensoj latinaj vortoj en si mem havas ian specialan elegantecon. *Ceterum censeo linguam internationalem esse studendam.*

*Mikko Mäkitalo*

# Multlingva seminario pri multlingveco

La 4.12.07 mi partoprenis seminarion en Hanasaari/Hanaholmen pri multlingveco en Svislando, Svedio kaj Finnlando. Estis kelkaj interesaj prelegoj, plejparte pri la minoritataj lingvoj en koncernaj landoj kaj pri la kreskanta uzo de angla ĉie. Interesa ekzemplo estas la orienta parto de Svisio, kiu ja oficiale estas trilingva – germana, itala kaj rumanĉa (kiu fakte malkreskas). La orienta parto de Svisio nuntempe en la lernejoj havas la anglan kiel dua lingvo, en aliaj partoj la dua lingvo estas aŭ franca aŭ germana.

La laborlingvoj de la seminario estis la finna, la sveda kaj la angla, tamen bedaŭrinde la programo estis tiel plena ke post prelegoj kaj la podia debato ne estis multe da tempo por demandoj aŭ komentoj. Ĉar mi ne tuj volis proponi nian bonan solvon, Esperanton, ĝi restis ankoraŭ nekonata al la ĉeestantoj. Antaŭ la fino mi jam devis forkuri al la buso por atingi la trajnon. Sed unu bona afero estis ke konekte al mia nomo sur la partoprenantlisto estis menciita EAF – trilingve, eĉ sur la unua paĝo, do la aliaj povis vidi ke ”eta frato” observis kio okazis ...

Tamen la ĝenerala etoso de la seminario sekvis la nunan Europan kredon ke multlingveco en si povas konduki al liberigo de la diversaj lingvoj kaj interna kompreno, sed tio ja nur kondukas al plia dominado de la angla lingvo. Ke ni bezonas komunan lingvon krom ĉiuj aliaj, tion oni ne povas imagi.

*Börje Eriksson*

4. joulukuuta 2007 Hanasaaren ruotsalais-suomalaisessa kulttuurikeskuksessa järjestetyssä seminaarissa käsiteltiin mm. seuraavia kysymyksiä:

Pitääkö vähemmistökielillä olla omat maantieteelliset suojelualueet? Mitä yhteiskunnallista tukea tarvitaan, jotta vähemmistökielet voisivat kehittyä? Millä tavalla monikielisyys tukee yhteiskunnan kehitystä? Mikä on äidinkielen merkitys ihmisen identiteetille? Miten meidän tulisi suhtautua englannin kielen kasvavaan vaikutusvaltaan kielialueillamme? Seminaarissa käsiteltiin Suomea, Ruotsia ja Sveitsiä.

Suomen, ruotsin ja englannin välillä oli järjestetty simultaanitulkkaus. Seminaarin paneelikeskustelun teemana oli *Monikielisyys käytännössä* eli sama – ruotsiksi jopa sanamuodoltaan sama – kuin Esperantoliiton lokakuussa järjestetyn symposiumin.

Paikalla kuuntelemassa oli Esperantoliiton hallituksen jäsen Börje Eriksson.

Den 4 december 2007 under ett seminarium på Hanaholmen – kulturcentrum för Sverige och Finland, diskuterades bl.a. följande frågor:

Måste minoritetsspråken ha sina egna geografiska reservat? Vilka ramar ska samhället ställa upp med för att språkliga minoriteter ska kunna utvecklas? På vilket sätt kan flerspråkigheten stödja den samhälleliga utvecklingen? Vad betyder modersmålet för den enskilde individens identitet? Hur ska vi reagera på engelskans intrång i våra språkdomäner? Seminariet behandlade Finland, Sverige och Schweiz.

Mellan finska, svenska och engelska arrangerades simultantolkning. Temat för seminariets paneldiskussion, *Flerspråkighet i praktiken*, var precis samma som för symposiet som Esperantoförbundet arrangerade i oktober.

Med och lyssnade var Esperantoförbundets styrelsemedlem Börje Eriksson.

# Karavaani BR4 Rotterdamiin
# Karavano al Roterdamo BR4

Noin parikymmentä kiinnostunutta on tähän mennessä ilmoittautunut, ainakin alustavasti, BR4-karavaaniin. Sen toteutumisessa on vielä muutama mutka, esimerkiksi Rotterdamin hotellihuoneet on vielä varmistettava. Kuitenkin näyttää melko todennäköiseltä, että karavaani lähtee Turusta 17.7. ja palaa sinne 28.7.2008. Lehdessä 5/2007 ilmoitettu reitti saattaa vielä muuttua, mikä tietenkin vaikuttaa hintaan samoin kuin osallistujien lopullinen määrä. Liiton sihteeri Tiina Oittinen ottaa yhteyttä kaikkiin tähän mennessä ilmoittautuneisiin ja kertoo matkasta tarkemmin. Jos et saa häneltä viestiä, ole hyvä ja ota itse yhteyttä. Tiina toivoo myös pikaista yhteydenottoa, jos harkitset karavaanimatkaa, etkä vielä ole ilmoittautunut edes alustavasti. Yhteystiedot ovat sivulla 2.

Ĝis nun aliĝis dudeko de partoprenantoj al la karavano. Multaj detaloj ne ankoraŭ estas fiksitaj, kaj ĉefe necesas certiĝi la hotelĉambrojn en la kongresa urbo. Tamen ŝajnas nun tre ebla ke la karavano okazos kun ekveturo 17.7. el Turku kaj reveno tien 28.7.2008. La en EF 5/2007 proponita itinero povas ankoraŭ ŝanĝiĝi kaj tiel kompreneble ankaŭ la prezo. EAF-sekretario Tiina Oittinen kontaktiĝos kun ĉiuj, kiuj ĝis nun informis pri sia intereso partopreni la karavanon por doni pli detalajn informojn. Se vi ne ricevos mesaĝon de ŝi, estu mem en kontakto. Same kontaktiĝu plej eble baldaŭ kun Tiina, se vi ne ankoraŭ donis vian nomon al la karavana listo kaj deziras kunvojaĝi. Kontaktinformojn sur paĝo 2.

*Tiina Oittinen*

## Muut lehdet: Esperanto ja EU

Euroopan komission Suomen-edustusto julkaisee **europa**-lehteä. Siinä käsitellään laajasti eri näkökulmista Euroopan ja EU:n asioita. Vuoden viimeisessä, lokakuun lehdessä 7/2007 toimittaja Sanna Ala-Seppälä kirjoitti noin 1/3 sivun jutussa esperantosta ja sen mahdollisesta käytöstä EU:n työkielenä otsikolla ”Esperantostako EU:n työkieli?” Esperanto-lippu oli kuvituksena.

Jutun aluksi toimittaja toteaa, että esperanton harrastajat ovat väläytelleet, että esperantosta voisi tehdä EU:n työkielen. Jutussa haastateltu EAF:n puheenjohtaja Anna Ritamäki toivoi kielelle asemaa Euroopan unionissa.

”Kielten yhdenvertaisuus on 23 virallisen kielen EU-organisaation tärkeä periaate. Esperanton laajempi käyttö tukisi tätä.”

Jutussa myös haastateltu professori Jouko Lindstedt Helsingin yliopiston slavistiikan ja baltologian laitokselta uskoo esperanton sopivan EU:n käyttökieleksi. Silloin kenenkään äidinkieli ei olisi kokousten työkieli. Englantilaisten on helppo osallistua spontaanisti keskusteluun, kun kokousten valmisteluvaiheessa käytännön kielenä on englanti.

Euroopan komission käännöstoimen pääjohtaja Juhani Lönnroth ei europa-lehdessä lämpene esperantolle.

”Kielen kehittäminen yhteiskieleksi vaatisi valtavia investointeja ja kestäisi kauan. Se ei edusta kenenkään kulttuuri-identiteettiä ja siksi sen suosiminen ei ole kestävällä pohjalla. Nyt esperantoa puhuu arviolta yksi promille EU:n väestöstä.”

Lönnrothin mielestä englannin käytössä ei ole ongelmaa, kun EU:n perussopimus turvaa monikielisyyden periaatteen ja kansalaisille taataan oikeus saada tietoa omalla kielellään.

*Jukka Noponen*

# La nekonata milito

*El Esperanta Finnlando, 1967 numero 7, paĝoj 52–53*

La jardeko 1940 tiom laborigis la eŭropanojn por iliaj propraj zorgoj, ke nemultaj havis tempon rimarki kverelojn sur la Nova Kontinento. Kaj tamen, en 1942, tie unu ŝtato perdis preskaŭ duonon de sia areo al najbara lando. Tiaj cedoj neofte estas esprimoj pri malavara donacemo. Legu do, kion kantoj de Suda Ameriko malkovris al nia kosmopolita korespondanto R. J. Milton.

Oni diras en Sudameriko, ke ”la kantoj rakontas”. Tioman rolon ludas la kantoj, ke estus malfacile imagi sudamerikan sociologon aŭ historiiston, kiu estus tonsurda.

Kiam mi alvenis Ekvadoron, mi rimarkis, ke du kantojn oni ĉiam kantis rikane. Oni kantis la mondfaman kanton ”Cielito lindo” (beleta blua ĉielo) kun malamo; nekonata viro foje ordonis min, ke mi ĉesu ludi ĝin per mia buŝharmoniko sur la strato. Duan kanton ”¿Donde están mis amigos?” oni kantis kun tiel troigitaj gestoj, ke evidente traktis pri simila fenomeno. Baldaŭ mi eksciis la kialon.

Peruo estas la suda najbaro de Ekvadoro. La peruaj militistoj vestiĝis per ĉielblua uniformo laŭ la malnova franca maniero. Tial la malamo de ”Cielito lindo”.

En 1941 ekaperis ondo de ĉielbluo ĉe la suda landlimo de Ekvadoro. Komenciĝis la Nekonata Milito. Nekonata ĝi estas ĉar en tiu turmenta jaro neniu konsciis pri ĝia ekzisto – oni atentis siajn proprajn militojn – kaj ege malmultaj eĉ nun scias, ke ĝi okazis. La enciklopedio ”Otavan Iso Tietosanakirja” mencias ĝin nur per unu linio sub ”Peru” kaj neniel sub ”Ecuador”; ĝi diras, ke la milito okazis pro ”malnova disputo”. Kiel malnova? Eble ĝi estis tre malnova, ĉar malmultege da ekvadoranoj memoris aŭ konsciis pri ĝia ekzisto antaŭ la malbonfama jaro 1941.

Dum tri semajnoj la ekvadora armeo batalis kontraŭ la invado. Iuj diras, ke ili estis kuraĝaj, aliaj, ke ili estis nur bandaĉo de timemuloj. Inter la lastaj troviĝas turistoj, kiuj vojaĝas por rekonvinkiĝi pri la supereco de sia propra provinco, kaj ĵurnalistoj, kiuj faras ”flugantan viziton” longan de unu tago ĝis unu semajno kaj sekve reiras al sia hejmlanda oficejo por skribi la ”tutan veron”.

Dum la tria semajno, la peruanoj anoncis, ke ili aerbombardos Guayaquil’on, kiu estas havena urbo proksimume samgranda kiel Turku kaj la plej granda urbo de Ekvadoro. Imagu, ke preskaŭ ĉiuj domoj en Turku estus faritaj el bambuo, multe pli brulema materialo ol ligno. Tia estis tiama Guayaquil. Aldonu al tio, ke Ekvadoro posedis eĉ ne unu militan aeroplanon. Fino. Restis nur demandi la kondiĉojn de paco.

La milito estis rimarkinda pro aliaj cirkonstancoj: Peruo eĉ ne inventis provokaĵon, sed nur atakis. Due, iuj tiamaj usonaj aŭtoritatuloj ŝajne aprobis la peruan agon, ĉar Ekvadoro ŝuldis al Usono tro grandan monsumon kaj ne povis aŭ ne volis repagi ĝin.

Kaj trie, la kondiĉo de la Paco de Rio de Janeiro (1942): Ekvadoro devis fordoni al Peruo teritorion, kiu estis preskaŭ duono de ĝia ĝistiama landareo. En 1946, la sento de humiliĝo kaj malamo kontraŭ Peruo ankoraŭ estis furioza kaj kontaĝa. Kaze de nova milito kontraŭ Peruo, mi mem estus tuj aliĝinta la ekvadoran armeon. Nur iomete malpli ili malamis la usonanojn. La nura vorto ”mister” (angle: sinjoro) estis insulto komparebla kun kelkaj finnaj insultvortoj, kiujn mi ne volas ripeti ĉi tie. Sed eĉ hodiaŭ mi sentas malracian furiozon, kiam oni alparolas min per

”mister” Milton.

Ho jes, mi forgesis mencii, ke ”¿Donde están mis amigos?” estis perua kanto. Imagu mian miron, kiam mi vojaĝis al Argentino kaj en kabareto aŭdis tiun kanton tute rekte kantata, sen ia ajn rikanado.

Sed ho ve! Ĉiu medalo du flankojn posedas. La argumentoj de politikistoj kaj de diplomatoj estas malpli amuzaj ol la surlokaj impresoj kaj emocioj, sed ili estas pli gravaj. Paciencon mi petas, ĉar unu el la argumentoj de la peruanoj estis ege grava.

La peruanoj inventis neniun provokaĵon, sed tute honeste anoncis sian kialon ataki: ili intencis alporti civilizecon al la orienta teritorio de Ekvadoro, ”kiun la ekvadoranoj ne scipovas ĝuste regi”. Tiu teritorio estis preskaŭ tiel granda kiel la resto de Ekvadoro – laŭ sia areo. Laŭ sia evoluinteco ĝi estis nula.

Nuntempaj terminoj estas ”evoluintaj landoj” kaj ”evoluantaj landoj”. Oni parolas ankaŭ pri ”evoluintaj regionoj” de unu lando. Tia estis la diferenco inter la okcidenta duono de Ekvadoro – la marborda kaj montara regionoj – kaj la orienta parto, kiun la peruanoj forprenis. Ĉi tiu enhavis nur dikan ĝangalon kaj kelkajn odoraĉajn alfluaĵojn de la Amazona rivero. Mi ne scias, ĉu la loĝantoj nombris 1 ĉu 10 % de la tutlanda enloĝantaro, ĉar neniu estis taksinta ilin. Mi dubas, ĉu la ekvadoranoj sciis, kiuj triboj troviĝis en la Oriento. La nuraj ursoj en la amazona ĝangalo estis tiuj, kiuj forprenis impostojn de la malmultaj kulturistoj de kaŭĉuko.

Cetere la ekvadoranoj estis farintaj nenion por helpi siajn orientanojn. Iuj vivis ankoraŭ feliĉaj laŭ siaj tribaj kutimoj.

Aliaj, jam perdintaj sian triban vivon, spertis nur la nulan mizerecon de homoj, kiuj troviĝas ĉe la malsupra ŝtupo kaj faras neniun progreson en la ĝusta direkto. Oni ĝuste nomas la militon ”la Nekonata”; egale ĝuste oni nomis la orientajn ekvadoranojn ”la forgesitaj”.


Tia estis la situacio en 1941, antaŭ ol la peruanoj atakis kaj forprenis la ”Orienton”: eble 90 % de la loĝantoj troviĝis en la relative evoluinta duono de la lando, la resto vivis en izoleco, mizero kaj malprogreso. Ĉu tio ŝajnas konata?




**Ek de sia naskiĝo el la patrina Unio de Granda Kolombio en 1830, Ekvadoro havis limdisputojn kun sia suda najbaro Peruo. La limon trans la Amazona ĝangalo difinis dckumentoj neniam ratifitaj sed ĉiam dubataj de ambaŭ flankoj. La dubojn finis nur milito kaj la posta protokolo de Rio de Janeiro en 1942.**

***Laŭ propono kaj per helpo de Harri Laine ni republikigas ĉi tiun artikolon el antaŭ kvar jardekoj.***

# Fabelo internacia 2007



## Draketo

En malgranda imperio Drakonio vivis unu draka familieto. Drakino Rozalie, drako Julius kaj draketo Dudek. Ĉiuj nomis lin tenere Dudla. Precipe kiam li ploris siajn drakajn larmojn, kiuj estis tiel same grandaj, kiel la larmoj krokodilaj. Sed neniu antaŭdivenis, kial Dudla cetere ploras.

Rozalie kaj Julius estis zorgemaj gepatroj. ”Kompatemulo Dudla”, bedaŭris lin panjo.”Kial li tiom ploras?”

“Li estas simple fiplorulino,” murmuris patro.” Vi trodorlotis lin. Drako ne povas esti tiu molulo. Eĉ kiam li ne havas plori por io, li ploras kiel testudo,” aldonis la patro kutime. Vere li ankaŭ bedaŭris fileton kiel panjo, sed nur ne volis, ke iu eksciu tion. Li pensis, ke tio ne taŭgas por la drako.

Al Dudla alvenadis najbarinoj, amikinoj, amikoj, eĉ kapo de draka gento en Drakonio Gordon I.

“Kun Dudla faras zorgojn ĉiuj drakoj en nia lando. Ni devas iel kun tiuj larmoj konsili. Mi kunprenos lin en mian drakan groton, ke trarigardu lin kuracistoj el najbaraj landoj,” decidis Gordon I.

Kion fari? La gepatroj jesis. Ili sciis, ke la fileton kontrolos la plej bonaj kuracistoj. Eble ili sukcesos trovi kaŭzon kaj medikamenton je tiu draka ploro.

Kiam kunvenis ĉe la draketo kuracista konsilio, Dudla kun okuloj plenaj de larmoj atendis, kion ili faros. Post trarigardo ili foriris en najbaran groton konsili. Dudla restis sola kaj volis komenci denove plori.

“Ho, vi!” ekaŭdis li malfortan voĉeton. Li rigardis ĉirkaŭ, sed li nenion vidis. “Ĉu vi ne vidas min?” denove li aŭdis la voĉeton. “Ha lo, Dudlo, ĉi tie rekte,” daŭris la voĉeto.

“Kiu vi cetere estas?” demandis Dudla, kiam li apude vidis…….li verdire ne sciis kiun. Estis tio ia draka knabineto, sed eksternorma.

“Mi estas bona draka feino, kiu helpas al malgrandaj draketoj, kiel vi. Kial vi senĉese ploregas?” interesis Gula.

“Mi…ne …scias..” rampis el Dudla.

“Rigardu, mi donos al vi mian amikon, kiu al vi helpos, kiam al vi estos malbone, ”diris Gula.

“Jes? Montru al mi, kie li estas?“ viviĝis Dudla. Sed tuj malgajiĝis, kiam li vidis en sia mano malgrandan guman tubeton sur radeto el

artefarita materialo. “Kaj tio estas la amiko por miaj malgajoj?” dubis Dudla kaj volis komenci kun ploro.

“Precize tiel. Elprovu, kiel li funkcias!” stimulis lin Gula.

“Kiel mi povas elprovi lin?” ne sciis Dudla.

“Donu en buŝon kaj suĉu!”

Dudla atenteme kaj kun malkonfido enmetis guman tubeton en sian draketan buŝon kaj liaj okuloj ekbrilis.

“Kio?” demandis Gula. ”Bona amiko, ĉu?” Ŝi ridetis.

“Eminenta. Nun mi sentas min bonege.” diris Dudla kun guma tubeto en buŝo.


“Do, tio estas lia tasko. Vi havas lin de mi, kiel donaceto. Nun mi jam devas flugi, atendas min ankoraŭ aliaj etuloj. Saluton!” disadiaŭis Gula.

“Kaj kiel vi nomiĝas?” vokis Dudla, sed Gula jam lin ne aŭdis.

Post momento alvenis kuracista konsilio. Ili restis stari kun malfermitaj buŝoj, kiam ili vidis, ke Dudla kontente suĉas guman tubeton kaj larmoj nenie.

“Kiel tio estas ebla?” nur unu kuracisto estis kapabla tion diri. Sed nur Dudla konis respondon. De tiu tempo jam neniam li ploris, kiam li havis sian amikon suc’pecon.

*Katka Morkesova*



*Bildoj (c) www.dreslough.com*

## Fabelkonkurso 2007

Zdenka Novotna de Ĉeĥio estas instruistino de infanoj kiuj jam de la jaro 2001 partoprenis al Fabelkonkurso. Ĉi-jare la premion Fabelo Internacia gajnis Katka Morkesova, 13-jaraĝa lernantino de Zdenka Novotna. Zdenka vizitis en Finnlando en aŭgusto ĉi-jare kaj Aini Vääräniemi intervjuis ŝin. Zdenka rakontis:

‘Kiam mi estis infano, mi ofte rakontis al miaj ses pli junaj gefratoj fabelojn. Ilia heroo estis ĉevaleto kun kiu ili travivadis diversajn aventurojn. Poste mi estis instruistino en fundamenta lernejo. Kiam mi antaŭ 30 jaroj komencis lerni Esperanton, mi tuj instruis ĝin al miaj gelernantoj, kiuj interesiĝis pri ĝi. Nun mi jam de longe estas pensiulino. Kiam mi pensiuliĝis mi trovis alian manieron kiel agadi por Esperanto kune kun infanoj. En la jaro 1995 mi unuan fojon veturis eksterlanden kun Esperanto-grupo. Ni vizitis Grezijonon en Francio. Infanoj havis naciajn kostumojn de nia regiono, ili dancis popolajn dancojn, kantis popolajn kantojn, rakontis pri kutimoj, rakontis fabelojn kaj faris scenetojn. De tiu tempo, krome unu jaro kiam Esperanto-infanoj de Anglio vizitis nin, ni ĉiujare veturas eksterlanden kun kultura programo. Infanoj scias kien ni veturos en estonta jaro kaj krom lernado de Esperanto ili lernas dancojn, kantojn kaj fabelojn. Ni renkontiĝas ĉiusabate. Infanoj kun ĝojo skribas fabelojn. Mi pensas ke tiu kreiva laboro alportas ali li pli ol pasiva rigardo de televido. Fari fabelan konkurson estis eminenta ideo!’

*Aini Vääräniemi*

## Universala Medicinista Esperanto-Asocio

Ĉiuj, kiuj laboras en la kampo de medicino aŭ speciale interesiĝas pri medicinaj aferoj kaj konas Esperanton povas aliĝi al la organizaĵo UMEA. La jara kotizo estas 16 eŭroj. Studantoj pagas 8 eŭrojn. Pagante la jaran kotizon oni ricevos la fakan gazeton Medicina Internacia Revuo, kiu aperas dufoje jare.

Vian kotizon pagu al konto Arja Kuhanen, 800020-03612644 kaj informu pri via nomo kaj adreso al la adreso *arja.kuhanen@netti.fi* aŭ Arja Kuhanen, Saratie 2 , 31300 Tammela.

### Jubilea medicina kongreso en Krakovo, Pollando 13-a ĝis 18-a de julio 2008

La ĉefaj temoj de la kongreso estas:

– 100 jaroj de Universala Medicinista Esperanto-asocio
– Aktualaj atingoj de medicino kaj farmacio
– Ĉu Esperanto evoluiĝos inter medicinistoj
– Esperanto kiel laborlingvo en Unuiĝinta Eŭropo

Aliĝ-kotizo estas 20 eŭroj. Tuttaga manĝaĵo kostas ĉ. 14 eŭrojn kaj unu tranoktado ĉ.12 eŭrojn. Ĉion eblos pagi surloke.

Petu aliĝilon ĉe adreso *arja.kuhanen@netti.fi* aŭ *umea@interia.pl*

### Subtena mono por la jubilea medicinista kongreso

Eblas speciale subteni la sukceson de la jubilea medicina kongreso pagante 100 eŭrojn al la konto de la prezidanto de UMEA:

D-ro Imre Ferenczy, Kaloczy ter 15, HU-9026 GYÖR – banko: MTB RT, 1122 Budapest, Pethenyi koz 10 – konto IBAN: HU95 58600283-15360032-00000000 – BIC KODO: TAKBHUHB

La donacitan monon oni uzos por kovri kostojn de organiza laboro kaj por ebligi partoprenon de medicinistoj el malriĉaj landoj. La subtenantoj ricevos Esperantan-Anglan Medicinan terminaron de prof. Saburo Yamazoe, jaran abonon de Medicina Internacia Revuo kaj specialan insignon de la kongreso. Oni ankaŭ publikigos nomliston de la subtenantoj en la kongresa libro.

*Arja Kuhanen,landa delegito de UMEA*

## Tutmonda kongreso de esperantistoj-ĵurnalistoj en Vilnius, Litovio

### 26.–30.05.2008

Ĉeftemo estos "Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto". La Kongreso ankaŭ ligiĝos al Internacia Jaro de Lingvoj kaj al la proksimiĝanta 1000-jariĝo de Litovio en 2009 kaj al Vilnius kiel Europa kultura ĉefurbo en la sama jaro. La kongreso okazos en la malnova historia urbodomo de Vilnius (str. Did•ioji 31). Veni al la kongreso preferindas jam la 25-an de majo 2008. Dezirantoj povos uzi la semajnfinon antaŭ la kongreso kaj la semajnfinon post la kongreso.

Al la kongreso estas invitataj membroj de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio), ĉiuj aliaj profesiaj kaj praktikantaj ĵurnalistoj, homoj de apudaj profesioj rilataj al ĵurnalismo. Antaŭvidataj estas ĉirkaŭ 100 partoprenantojn.

Kontaktadreso – aliĝo ĝis 30-a de aprilo: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Telefono: +370-37-208503 (landa kodo, urba kodo, numero). Poŝtelefono: +370 687 12219. Telefakso: +370 37-228616. Retadreso: *litova.ea@mail.lt*

## Internacia E-aranĝo en Bulgario 1.–10.7.2008

Dek-taga aranĝo en la temoj turismo, kulturo kaj historio en la marborda urbo Carevo, hotelo Panorama. Limdato por aliĝo 28.2. Kontaktinformoj: Boris Gaĝanov, str. Petar Janev, 21 4600 Velingrad, Bulgario. Tel. 003 593 595 4204, mob. 003 598 986 762 70. Retpoŝto: *gadzanov_b@abv.bg*

## 10a Internacia Fotokonkurso

La Ondo de Esperanto organizis en 2007 la dekan Internacian Fotokonkurson. Partoprenis 61 fotoverkoj de 18 fotoaŭtoroj. La juĝkomisiono decidis la 1an premion (50 e kaj abono de La Ondo de Esperanto) por Barbara Chodera el Pollando. Speciala premio (50 e kaj abono de La Ondo de Esperanto) pro la plej bona foto pri la temo "Festo" estis donita al Shoko Sakaeda el Japanio.

*Halina Gorecka, sekretario de la konkurso*

Legu pli pri la Internaciaj Fotokonkursoj: *http://esperanto.org/Ondo/Fkonkurs/Fk2007.htm*

## Printempo en Jyväskylä

En la studrondo ni konatiĝos kun Nordiaj popoloj. La printempa ĉefa temo estos la sameoj. La loko: Sepänkeskus, Happi-ĉambro, adreso Kyllikinkatu 1.

**lundo 25.2. 15-18** Studrondo; sameaj popolkostumoj, bredado de boacoj

**lundo 10.3. 15-** La ĝenerala printempa kunveno de la klubo. Pritraktotaj la agadraporto, la bilanco de la jaro 2007 kaj la printempa/somera programo.

**lundo 7.4. 15-18** Studrondo; pri la historio de sameoj

**lundo 21.4. 15-18** Studrondo; pri la samea kulturo

**lundo 5.5. 15-18** Studrondo; Feroaj insuloj

**lundo 19.5. 15-18** Studrondo; Ni en Skandinavio, diskuto pri niaj karaj najbaroj svedoj, norvegoj kaj danoj

Dum la printempa ekskurso ni migros ĉijare sur la pado de Birgitta (*Birgitan polku*) en Lempäälä. Pasintjare en Vääksy kolektiĝis 30 partoprenantoj el diversaj partoj de Finnlando.

*prez. Seija Kettunen,*
*040 867 2743,*
*kari.kettunen@pp1.inet.fi*

## Esperanto-societo en Turku printempe 2008

Esperanto-societo en Turku havis la laŭstatutan jarkunvenon 3-an de februaro 2008 en Civitana instituto de Aurala. Elektitaj funkciuloj: Tiina Oittinen, prezidanto, Anna-Liisa Ali-Simola, vicprezidanto, Leena Tiusanen, sekretario, Veikko Tikkanen kasisto kaj estrarvicmembro. Aliaj estrarmembroj: Paula Harju, Väinö Havu, Varpu Karo, Anja Launiainen kaj vicmembro Merja Uotila. Revizoroj: Ilpo Forsström kaj Matti Jaakkola, vicrevizoroj Jorma Ahomäki kaj Leila Laineoja.

La esperantokursoj aranĝitaj de la societo daŭrigas en la Civitana instituto de Aurala marde je 15.30-17.00. Merkrede ĉirkaŭ inter 16.30 kaj 17.30 ni kolektiĝas en kafejo Sirius de la nova ĉefbiblioteko, adreso Linnankatu 2. Krom kutimaj babilaj momentoj tiam la Diskutrondo de la societo, oficiala studklubo (*opintopiiri*), legas la libron de E. Privat pri L.L. Zamenhof. Printempe ni planas viziton al la biblioteko de Åbo Akademi kaj kontrolas tiam ankaŭ la staton de la Esperanto rozo el jaro 1995. Ekskurson ni laŭ nunaj planoj faros en majo al la fama insulo Ruissalo. Vizitantoj estas ĉiam bonvenaj, Kontaktuloj: Tiina Oittinen (vidu p. 2) kaj Leena Tiusanen (tel. 02-2320542).

*Turun Esperanto-yhdistyksen esperantokurssilla Auralan kansalaisopistossa alkaa uusi alkeiskurssi aina tarvittaessa. Myös esperantoon jo tutustuneet ovat tervetulleita kertaamaan tietojaan. Kurssiaika on tiistaisin klo 15.30-17.00 huhtikuun alkuun asti (ei vkolla 8). Yhdistyksen jäsentapaaminen on keskiviikkoisin uuden pääkirjaston kahvila Siriuksessa, Linnankatu 2, noin klo 16.30-17.30. Retkiä ja vierailukäyntejä on kevätkaudella suunnitteilla Åbo Akademin kirjastoon ja Ruissalon saarelle. Vierailijat ovat aina tervetulleita. Lisätietoja yhdistyksen puheenjohtajalta (Tiina Oittinen, p 02-2305319) ja sihteeriltä (Leena Tiusanen puh. 02-2320542).*

# Claude Piron ne plu inter ni



Claude Piron, Honora Membro de UEA, populara Esperanta verkisto kaj pedagogo kaj amata preleganto, forpasis la 22-an de januaro hejme en Gland, Svislando. Li naskiĝis en Namur, Belgio, en 1931.

Piron laboris kiel tradukisto-protokolisto por Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko 1956-1961 kaj poste por la Monda Organizaĵo pri Sano i.a. en Ĝenevo, Azio kaj Afriko. Trejnita kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto, li komencis praktiki psikoterapion en 1969. Li instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fako de la Ĝeneva Universitato de 1973 ĝis emeritiĝo en 1994. Poste lia ĉefa aktiveco apud psikoterapia praktikado estis profesie trejni junajn psikoterapiistojn.

Claude Piron esperantistiĝis en 1942. Membro de la Akademio de Esperanto li estis de 1979 ĝis 1988. Jam frue Piron ekverkis en Esperanto, gajnante premiojn en Bellartaj Konkursoj de UEA. Piron estis granda porparolanto de lingvo, kiu evitas novismojn kaj klopodas efike eluzi proprajn eblojn de la Esperanta vortprovizo. Siajn principojn li klarigis profunde kaj polemike, interalie per psikologiaj eltrovoj, en la libro ”La bona lingvo” (1989; 2-a eld. 1997) kaj li aplikis ilin tute precipe en facillingvaj rakontoj por ”Kontakto” en la 90-aj jaroj kaj en didaktike verkitaj romanetoj por komencantoj. Eksterordinare furora fariĝis la krimromaneto ”Gerda malaperis” (1983), multfoje represita kaj vendita en miloj da ekzempleroj. La kantokasedo ”Frandu piron” (1982) atestas pri lia spriteco kaj multflankeco.

Claude Piron famiĝis ankaŭ kiel unu el la plej elstaraj kaj vervaj pledantoj por Esperanto kiel solvo de la lingva problemo en la internacia komunikado. Krom en Esperanto-aranĝoj li faris sennombrajn prelegojn antaŭ ne-esperantista publiko, i.a. en seminario ĉe Unesko (1986) kaj dum studotago en la Eŭropa Parlamento (1993). Li publikigis diverslingve multajn artikolojn pri internacia kaj interkultura komunikado. Por la serio de Esperanto-dokumentoj li verkis plurajn kajerojn, i.a. ”Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?” (1977) kaj ”Psikologiaj reagoj al Esperanto” (1988).

Universala Esperanto-Asocio aljuĝis al Claude Piron du el siaj plej gravaj distingoj. En 1994 li ricevis la Premion Onisaburo Deguĉi pro sia kontribuo al la antaŭenigo de internacia amikeco per Esperanto. En 1998 li fariĝis Honora Membro de UEA.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

# Alvoko – Kutsu – Kallelse


La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos dimanĉon, la 9an de marto, 2008 je la 10a horo en hotelo Kuninkaantie, Lakelankatu 1, Espoo. En la kunveno estos traktitaj la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina 9.3.2008 klo 10.00 alkaen hotelli Kuninkaantiessä, Lakelankatu 1, Espoo. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

Esperantoförbundet i Finland håller sitt stadgeenliga årsmöte söndagen den 9.3.2008 kl. 10.00 i hotell Kuninkaantie, Lakelankatu 1, Espoo. Mötet behandlar de i förbundets stadgar föreskrivna årsmötesärendena.

# Vintraj Tagoj en Espoo
# Talvipäivät Espoossa 8.-9.3.2008

***Jaro de la lingvoj kaj 100-jariĝo de UEA – ambaŭ en 2008***
***Kielten vuosi ja UEA:n satavuotisjuhla – kumpikin vuonna 2008***




***A = Hotelo Kuninkaantie, nia kunvenejo. B = haltejo "IKEA" de longdistancaj aŭtobusoj Turku-Helsinki. La nomo de la fervoja stacio Espoo estas markita per ringo.***

## Ekspozicia centro WeeGee

WeeGee, la ekspozicia centro de Espoo en la urboparto Tapiola, proponas vastan sortimenton de muzeoj, ekspozicioj kaj aranĝoj. En la domo funkcias kvin muzeoj, galerio de moderna arto, centro de media arto Cartes, muzea vendejo kaj kafejo-restoracio. La publiko povas ĝui pri pli ol 10 diversaj ekspozicioj kaj rilataj aranĝoj.

La domo estis origine la presejo de la eldona kompanio Weilin & Göös. Ĝi estis konstruita en la 1960-aj jaroj laŭ la desegno de profesoro Aarno Ruusuvuori. La arkitekturo de la domo estis bazita sur konstruktivismo, montrante la serian, multobligeblan kaj geometrian karakteron de la stilo. La uzitaj materialoj estas ŝtalbetono kaj vitro. Planado por transformi la domon al multflanka muzea kaj arta centro de la urbo Espoo komenciĝis dum la 1990-aj jaroj, kiam la presado finiĝis en la domo. La renovigaj laboroj kompletiĝis fine de la jaro 2005, dum la sekva oni preparis kaj malfermis ekspoziciojn, kaj la tuta domo estis inaŭgurita 13.10.2006. La domo ampleksas pli ol 23 000 m²; el kiu ekspozicioj kaj kulturaj aranĝoj okupas ĉ. 17 500 m².

### Granda spektro de muzeoj en WeeGee

**EMMA** – La muzeo de moderna arto de Espoo estas la plej granda arta muzeo en Finnlando kaj ofertas preskaŭ 5 000 m² da pinta arto. Ĉiujare okazas 4-5 diverstemaj internaciaj ekspozicioj aldone al la prezentoj de la konstantaj kolektoj Saastamoinen kaj Utriainen.

**La urba muzeo de Espoo** estas historia muzeo kaj montras kia estis kaj la ĉiutaga kaj la festa vivo en Espoo dum la jarcentoj de ĝia historio. Tra historio vi spertos la vojaĝon de Espoo ekde malgranda vilaĝo al la dua urbo en Finnlando.

**La muzeo de Helinä Rautavaara** estas kolorriĉa kaj varma renkontejo plena je mirindaj detaloj kaj unikaj iloj el eksterlando. La celo ĉitie ▷

estas koncentriĝi al la aktualaj multkulturaj fenomenoj kiujn naskis kaj naskas la interligoj de diversaj kulturoj.

**Leikkilinna**, la ludila muzeo, ofertas eblecon revivi la rememorojn kaj momentojn de infanaĝo. La muzeo havas ekspoziciojn, kursojn, fabelhorojn, ludilajn seminariojn kaj diversajn aranĝojn kun infanludoj.

La kolektoj de **Finnlanda horloĝa muzeo** enhavas centojn da horloĝoj el kvin jarcentoj, horloĝoj faritaj kaj uzitaj en Finnlando, kun abundo da kuriozaĵoj kaj monde gravaj objektoj. Ĝis la 4-a de aprilo la muzeo montros kolekton de falsitaj horloĝoj, t.n. pirataj kopiaĵoj de famaj markoj.

**Cartes**, la arta kaj informteknologia centro de Espoo, aranĝas kaj produktas elektronikan median arton. Cartes ofertas travivaĵoj per diversaj kaj surprizaj artaj manieroj, per diversaj artformoj el performancoj ĝis interagaj verkoj kaj reta arto.

En **Galleria Aarni** videblas aktualaj verkoj de finnlandaj artistoj; grafiko, fotoj, skulptaĵoj kaj pentraĵoj. La ekspozicioj, kiuj ŝanĝiĝas ĉiun kvaran semajnon, ofertas altkvalitan kaj multflankan vidpunkton al finnlanda moderna arto.

**Eniru**. Komencu vojaĝon al la senfine sata mondo de arto, scio, historio, kulturo, gustoj, odoroj kaj koloroj.

**Malfermaj horoj**: marde, vendrede, sabate kaj dimanĉe je 11-18, mekrede kaj ĵaude je 11-20
**Biletoj**: vizitantoj sub 18 jaroj senpage, plenkreskuloj 10 e por vizito en la tuta domo

**Transporto kaj WeeGee**: aŭtobusoj 106, 106T, 110T, 110TA, 194, 194A, 194N el/al Kamppi centro, Espoo-urbaj aŭtobusoj 15, 18, 18Z inter Tapiola kaj fervoja stacio. Horaroj en la reto: *www.ytv.fi*. Sur la korto parkejo por 100 aŭtoj.

**WeeGee en la reto**: *www.weegee.fi*

## EMMA 5.3.-25.5.2008

### 12 x Claude Monet kaj Finnlandaj impresoj, Maaria Wirkkala

La 12 verkoj de Claude Monet (1840-1926) en interparolo kun la verkoj de finnlandaj artistoj kiuj estis influataj per francaj impresionistoj: Victor Westerholm, Hanna Rönnberg, Elin Danielson, Magnus Enckell, Pekka Halonen kaj aliaj. Kiel moderna arto instalaĵo de Maaria Wirkkala farita por EMMA.



# Programo – Ohjelma

*(ŝanĝoj eblas – muutokset mahdollisia)*

## Sabato / Lauantai, 8.3.2008

11.00-12.30 Esperanton esittelykurssi aloittelijoille ja tutustujille.
12.00 VT-akceptejo en la hotelo. Talvipäivien vastaanotto hotellin aulassa. Lunĉo. Lounas.
13.00 Bonvenigaj vortoj, malfermo de tagoj. Tervetulosanat, päivien avaus.
13.30 Jouko Lindstedt: Lingvoj minacataj kaj mortontaj
Jubilea jaro de UEA. Kielten vuosi ja Esperanton maailmanliiton (UEA) juhlavuosi.
15.30 Kafo. Kahvi.
16.00 Vizito al la preĝejo de Espoo. Käynti Espoon kirkolla.
16.00 Kunvenoj de membroasocioj laŭ alvokoj. EAF:n jäsenjärjestöjen kokouksia kokouskutsujen mukaan.
17.45 Akcepto de Societo Nino Runeberg. Nino Runeberg -seuran vastaanotto.
18.00 Vespermanĝeto. Iltapala.
19.00 Memoroj pri la jubilea jaro, jubilea skatolo ktp. Juhlavuoden muisteluja, juhlalaatikko ym.
21.00 Komuna kaj libera kunestado. Vapaata yhdessäoloa.

## Dimanĉo / Sunnuntai, 9.3.2008

9.00 Matenpreĝo de KELF. / Aamuhartaus, järj. KELF.
9.30 Kontrolo de rajtigiloj. Valtakirjojen tarkastus.
10.00 Jarkunveno de EAF. Vuosikokous.
12.00 Lunĉo. Lounas.
13.00 Rondveturo en Espoo, gvidas Harri Laine: (i.a. Esperantovojo kaj kongresejo Dipoli). Espoon kiertoajelu, mm. Esperantotie ja Dipolin kongressikeskus. Oppaana Harri Laine.

**ALIĜILO**

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 8.-9.3.2008 en Espoo.

Nomo

______________________________

Adreso

______________________________

Tel./Fakso/Ret-adreso

______________________________

**Aliĝkotizo**

18e ĝis 29.2.2008 ____
21e poste ____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

VT-manĝopaketo ___ 55 e
(inkl. tagmanĝojn ambaŭtage, kafon kaj vespermanĝon sabate)

VT-hotelpaketoj en hotelo Kuninkaantie:
2-lita ĉambro ___ 38 e/persono
1-lita ĉambro ___ 65 e/persono

Rondveturo kaj kafo dimanĉe ___ 20 e

Entute pagenda al la konto de EAF ______

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.
Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informoj en pagilo).

Pliaj informoj aŭ deziroj al EAF:

______________________________

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra *eafmendoj@esperanto.fi*

**ILMOITTAUTUMISLOMAKE**

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 8.-9.3.2008 Espoossa

Nimi

Osoite

Puh./fax/sähköposti

**Ilmoittautumismaksu:**

18e 29.2.2008 saakka ____

21e 29.2.2008 jälkeen ____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Talvipäivien ruokapaketti
(sis. 2 lounasta, illallisen, kahvin) ___ 55 e

Talvipäivien majoituspaketti

2-hengen huoneessa ___ 38 e/hlö

1-hengen huoneessa ___ 65 e/hlö

Kiertoajelu ja kahvi sunnuntaina ___ 20 e

Maksut yhteensä Suomen
Esperantoliiton tilille _________

Tilinumero: Sampo 800017-230825.
Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia

Lähetä lomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse:
*eafmendoj@esperanto.fi*

14.30 WeeGee-domo de Espoo. Kafo kaj fermo de la tagoj. WG-Kultturitalo. Kahvi ja päivien päätös.

*Bonvenon – Tervetuloa!*

### Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Sendu aliĝilon al EAF-oficejo, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki aŭ aliĝu rete *eafmendoj @esperanto.fi*. Pagu la kotizon al la konto de EAF, nepre uzu la referencnumeron 4640.

Kontaktutoj Päivi Saarinen, vicprezidanto aŭ Tiina Oittinen, sekretario. Kontaktinformoj sur paĝo 2.

### Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Lähetä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki tai kerro tietosi sähköpostitse osoitteeseen *eafmendoj@esperanto.fi*. Maksa osallistumis- ja pakettimaksut ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa 4640.

Lisätietoja talvipäivistä antavat liiton varapuheenjohtaja Päivi Saarinen tai liiton sihteeri Tiina Oittinen. Yhteystiedot sivulla 2.

# ELFI

## Alvoko al jarkunsido

Jarkunsido de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj ELFI okazos sabate la 8an de marto 2008 je la 16.00 en hotelo Kuninkaantie, Espoo-Esbo. Estos traktataj la laŭstatutaj aferoj.

*La estraro*

## Kutsu vuosikokoukseen

Suomen opettajien esperantoyhdistys ry:n vuosikokous pidetään lauantaina 8. maaliskuuta 2008 klo 16.00 hotelli Kuninkaantiessä, Lakelankatu 1, Espoo. Käsitellään sääntömääräiset asiat.

*Hallitus*

**Jouko Lindstedt, prelego sabate:**

## Lingvoj minacataj kaj mortontaj

La lingva diverseco de la mondo estas miriga: ekzistas proksimume 6000 parolataj lingvoj kaj krome egale granda nombro da surdulaj gestolingvoj. La plimulto de la lingvoj estas tamen malgrandaj: pli ol duono de ili havas po malpli ol dek mil parolantojn, kaj nur kvin procentoj havas po pli ol milionon da parolantoj. La pluvivo de la plimulto de la lingvoj estas minacata, kaj almenaŭ duono de ili povos morti dum ĉi tiu jarcento. Revivigi mortintan lingvon estas malfacile kaj sukcesas nur en esceptaj cirkonstancoj.

Al la mortado de malgrandaj lingvoj oni povas rilati diversmaniere, depende de la valoroj alprenitaj: oni povas trovi ĝin natura, neevitebla kaj eĉ ekonomie dezirinda, aŭ oni povas rigardi ĝin kiel katastrofan perdon de intelekta heredaĵo de la homaro. La sinteno de la Esperanto-movado ŝanĝiĝis: en la komenco oni konsideris la lingvan diversecon ĉefe kiel malhelpon (”muroj de miljaroj”), kvankam malhelpon praktike neforigeblan sed transponteblan per Esperanto. Nuntempe oni aktive serĉas kunlaboron kun lingvodefendaj movadoj. Male ol multaj esperantistoj kredas, la superrega pozicio de la angla ne estas la ĉefa kaŭzo minacanta la malgrandajn lingvojn.

## Eventokalendaro de EAF

**2008**

8.-9.3.2008 Vintraj Tagoj, Hotelo Kuninkaantie, Espoo

23-27.6.2008 Esperantokursoj, Heinävesi (Valamon kansanopisto)

19-26.7.2008 Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo, Nederlando (UEA)

26.7-2.8.2008 Internacia Junulara Kongreso, Szombathely, Hungario (TEJO)

ESPOO 550 ESBO

## Espoo koncizege

Praformo de la urbonomo, kiu estas *Esbo* en la moderna sveda lingvo, unuafoje aperis en dokumentoj ĉ. la jaro 1430. Tiam ĝi estis skribita *Espa, Espå* aŭ *Espåå,* verŝajne el vortoj kiuj en la nuna sveda lingvo aperas kiel *asp* (tremolo) kaj *å* (rivero).

- la unuaj loĝantoj, post la glacia epoko, antaŭ 9000 jaroj
- samnoma paroĥo fondita en 1458; urbo ekde 1972
- nun la dua plej granda urbo en Finnlando
- 235 000 loĝantoj; finnlingvaj 84,4%, svedlingvaj 8,5%, alilingvaj 6,7%
- areo 528 $km^2$; terspaco 312 $km^2$, akvokovrita 216 $km^2$
- plej alta punkto 114,2 m, 165 insuloj, 95 lagoj
- 753 loĝantoj sur $km^2$ da tero
- najbaroj: Helsinki, Vantaa, Nurmijärvi, Vihti, Kirkkonummi, Kauniainen (ene de Espoo)
- konata pro teknologio (teknika universitato, ŝtata esplorinstituto, monda ĉefoficejo de Nokia, k.a.) sed ankaŭ pro la ĝardena urboparto Tapiola kaj la lagoregiona nacia parko Nuuksio
- pli en retpaĝoj de Espoo: *www.espoo.fi*, vidu tie *Espoo-info*

# Valamo kursosemajno 23.-27.6.2008

En EF 5/2007 aperis alvoko aliĝi al ebla sugestopedia kurso en Valamo 2008. Ĝis fino de januaro tamen ne venis sufiĉe de tiaj deziroj, do ni decidis ankaŭ ĉi-jare aranĝi la tipan daŭrigan kurson kun tekstoj, lernado de gramatikaĵoj, diskutoj ktp ktp.

En la ĉi-jara kurso, tamen, estos kelkaj trajtoj de la sugestopediaj kursoj. Ni elektos ankaŭ temon por la kursosemajno, kiu estos la ruĝa fadeno por ĉiuj kursoniveloj. Vi, kiuj planas veni al Valamo, estas bonvenaj proponi temojn.

Nun gravas denove ke sufiĉe da personoj aliĝu al la kurso en Valamo. Kvankam ni jam ricevis provizorajn aliĝojn de eblaj kursanoj, ankoraŭ mankas sufiĉe da interesitoj por atingi la minimuman nombron por rajti okazigi la kurson.

## Prezo- kaj aliĝinformoj

Prezo de la kursosemajno estas 190 eŭrojn (2-lita) aŭ 210 eŭrojn (1 lita). La prezo enhavas la instruadon, tranoktadon (en gastejo sen propra banejo) kun matenmanĝo, festan vespermanĝon kaj kafon/teon dum taga ekskurso. Manĝopaketo por aliaj manĝoj: 61 e.

Kontaktulo estas kursogvidanto Tiina Oittinen, sekretario de EAF, adreso: Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, tel: 02-230 5319, *eafsekretario@esperanto.fi*.

Se vi parolas la finnan, vi povos aliĝi rekte al la Popola instituto. Notu tamen, ke la personaro en Valamo nek parolas esperanton nek respondas al esperantlingvaj retpoŝtoj. Petu do aliĝilon kaj pliajn informojn de Tiina.

Memoru la eblecon viziti la monaĥejan areon de Valamo 26.-27.6. Eblos ankaŭ venontsomere viziti Valamon dum la kursosemajno por du tagoj: alveno posttagmeze ĵaude, partopreno en la festa vespermanĝo kun la kursanoj kaj konatiĝo kun la monaĥeja areo. Kiel kursogvidanto Tiina Oittinen zorgos pri la programo ekster la lecionoj kaj donos bazajn konsilojn ankaŭ al la vizitantoj. Informiĝu ĉe ŝi.

Por vidi kia la loko estas, iru al *www.valamo.fi*. Esperante vi trovos kursoinformojn, ekzemple la detalan programon, en *www.esperanto.fi*.

## Valamon kurssiviikko 23.-27.6.2008

Tämänvuotisella kurssiviikolla järjestetään alkeiskurssi ja jatkokurssi samantyyppisesti kuin parina aikaisempana vuonna. Suggestopediselle kurssille ei tällä kertaa ollut tarpeeksi kysyntää, joten palataan siihen joku toinen kerta. Olemme tähän mennessä saaneet useita tiedusteluja, mikä on todella ilahduttavaa, mutta vielä tarvittaisiin muutama varma ilmoittautuminen lisää, jotta ylipäätään voimme toteuttaa esperanto-kurssiviikon.

Alkeista aloittavien toisena opetuskielenä esperanton lisäksi on pääasiallisesti suomi, tarvittaessa myös muita kieliä voidaan käyttää apuna. Kurssiviikolle tulee yhteinen teema, joka yhdistää kaikki kurssitasot, erityisesti vapaa-ajan ohjelman aikana, jolloin kaikki kurssilaiset ovat yhdessä.

## Kurssihinta ja ilmoittautuminen

Viiden päivän kurssin hinta on 190 e (2 hh) tai 210 e (1 hh). Hintaan sisältyvät opetus, majoitus aamiaisineen vierasmajassa (WC:t ja suihkut käytävällä), kahvi retkipäivänä ja juhlaillallinen viimeisenä iltana. Ateriapaketti muita ruokailuja varten maksaa 61 e. Kurssi alkaa maanantaina klo 9.00 ja päättyy perjantaina klo 11.00.

Jollet vielä ole ilmoittautunut varmasti, tee se heti joko suoraan Valamoon tai kurssivastaavan, liiton sihteerin Tiina Oittisen kautta (yhteystiedot lehden sivulla 2). Yhteystiedot Valamoon: Valamon kansanopisto, Valamontie 42, 79850 Uusi-Valamo, puhelin myyntipalveluun 017-570 1810, sähköposti: *opisto@valamo.fi*. Liiton nettisivuilla *www.esperanto.fi* on nähtävissä kurssiviikon ohjelma ja muuta tietoa Valamosta sekä linkki Valamon sivulle *www.valamo.fi*.

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@welho.com*.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 💻 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 💻 kari.kettunen@pp1.inet.fi
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. 💻 martti.pennanen@phnet.fi
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry, (Olli Pajula) Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. 💻 http://esperantooulu.info/ olli.pajula@baanamail.fi
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Eero Saari) Kössinkatu 2 as 7, 24100 Salo. ☎ (02) 735 6130
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 💻 markku.saastamoinen@jippii.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. 💻 cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 445023-283606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 📠 (09) 660 651
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 12 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnassa on perustettu uusi yhdistys, Verda Kastelo R.Y. – Esperanto-Societo en Hämeenlinna, joka ei vielä ole EAF:n jäsenjärjestö. Yhteystiedot: Markku Sarastamo, Jyrätie 6 a 15, 13500 Hämeenlinna. 💻 verdakastelo@gmail.com

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna**
**aperas dum la jaro** **2008**

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 2 | 10.3. | 15.3. | 5.4. |
| 3 | 10.5. | 15.5. | 5.6. |
| 4 | 10.7. | 15.7. | 5.8. |
| 5 | 10.9. | 15.9. | 5.10. |

## Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 e | 1/1 sivu/paĝo 50 e |
| 1/2 sivua/paĝo 60 e | 1/2 sivua/paĝo 30 e |
| 1/4 sivua/paĝo 40 e | 1/4 sivua/paĝo 20 e |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

# Koran dankon al ĉiuj en nova jaro kun novaj fortoj



Post sep jaroj kiel prezidanto, inter tiuj la jubilea jaro 2007, mi ne plu kandidatas al la gvida pozicio de Esperanto-Asocio de Finnlando. Ni havas novan jaron kun novaj fortoj. Ankoraŭ mi ne havas certajn informojn pri prezidanta kandidato, sed mi scias ke estas kompetentaj homoj en la estraro, jam elektitaj kaj interesitaj kandidatoj. Sed tro da kandidatoj ni ne havas. Ne hezitu proponi nomojn!

En la nova EAF-jarcento la asocio revenas al la bazaj demandoj: Por kio ekzistas la asocio kaj kiel realisme kaj sukcese realigi la bezonojn de la membraro? Mi estos inter la ordinaraj membroj, eventuale kun iuj konsilaj aŭ momentaj taskoj. Mi antaŭĝojas ĝui la servojn kiel ordinara membro, sed volonte mi de tempo al tempo kontribuos per agado, interalie kunlaborante pri tiu ĉi gazeto. Mi daŭre prizorgas la EAF-agadas-liston ĉe Yahoogroups, listo malferma por ĉiuj membroj.

Mi volas aparte danki al ĉiuj pro la granda envolviĝo dum la jubilea jaro! Ni faris multon kaj ni faris tion en ĉiuj partoj de la lando. Feliĉe ni ankaŭ sukcesis realigi la abundan programon sen granda ŝarĝo al la asociaj financoj pro donacoj kaj grandaj subvencioj. Multajn agadojn realigis kaj eĉ financis la societoj kaj individuaj esperantistoj.

Fruktodonan novan jaron deziras

*Anna Ritamäki*

## FEJO-semajnfino venos

Estas planata la unua FEJO-semajnfino de tiu ĉi jaro por 29.2.-2.3 en Helsinki. La semajnfino enhavos la jarkunvenon, kies oficiala alvoko venos al membroj de FEJO aparte. Sekvu ankaŭ retliston *fejo@yahoogroups.com* kaj ttt-paĝon *www.esperanto.fi/fejo/aktuale.htm*

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Jutut 15.3.2008 mennessä EAF:n toimistoon. La venonta numero aperos en aprilo. Artikoloj ĝis 15.3.2008 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <*eaflehti@esperanto.fi*>.

**Cityoffset, Tampere 2008**